

FORSTISTA INFORMILO

de INTERNACIA FORSTISTA RONDO ESPERANTLINGVA

Nr. 27 Eberswalde, 1993-04-01

Informo pri IFRE- agadoj por plua evoluigo de la terminologia laboro

1. La nuna stadio de laboro

Nia vortara/terminologia laboro atingis gravan etapon per la kreado de provekzempleron de "Lexicon silvestre", kiel nun estas nomita nia verkaĵo. Ni raportis pri tio en la lasta numero de FI. Intertempe ni plibonigis la difinojn kaj ankaŭ la elekton de terminoj en diversaj lingvoj. Speciale la angla kaj la bulgara partoj estas amplekse ŝanĝitaj. Por la datumoj ni nun preparis PARADOX-programaron por la utiligo kiel datenar-bazon.

2. Pri la publika varbado pri "Lexicon silvestre"

Ekde fino de la jaro 1992 ekzistas plena manko da monrimedoj por elspezoj, kiel por poŝtmarkoj, papero, riparado de komputiloj, multobligoj ktp. Ni nun ricevis krediton, por elsendi leterojn por varbi sponsorojn (mecenatojn).

Ni preparis publikaĵojn por "IUFRO-news", "Scienca revuo", "Esperanto aktuell", "Beiträge für Forstwirtschaft und Landschaftsökologie" kaj „Allgemeine Forstzeitschrift“.

En decembro de la pasinta jaro ni povis prezenti nian verkaĵon dum "Talk-show", aranĝita de la Berlina Esperanto-Asocio en Berlin-Kreuzberg.

Je la 11-a de marto ni okazigis en Eberswalde kolokvon pri "Lexicon silvestre", ĉar ni rimarkis, ke la imago pri niaj laboro kaj verkaĵo estis ne sufiĉiga kaj parte erariga kaj krome ni bezonas atentigojn rilate plibonigon de nia laboro. 25 personoj partoprenis kaj diskutis. Kelkfoje raportis la regionaj gazetoj pri nia laboro kaj la daŭrigo, minacata per la fino de la subtenado fare de la laboroficejo.

3. Pri alia subtenado de nia laboro

Antaŭ kelkaj tagoj s-ro Kempf, estro de la IUFRO- Subject Group S6.03, ĝiris al ni 2000 Svisajn Frankojn por subteni nian laboron.

Je la 16-a de marto naŭ anoj de nia laboroficeja projekto fondis asocion por subteni la pluan laboron pri "Lexicon silvestre".

Je la 18-a de marto ni povis diskuti kun la estro de la "Bundesforschungsanstalt für Forst- und Holzwirtschaft" en Hamburg pri eblecoj daŭrigi nian leksikan laboron. Li rekomendis al ni, direkti proponojn pri projektoj al Bonna ministerio kaj Eŭropa Komunumo. - Tiaj niaj provoj lastjare estis vanaj. -

4. Pri estontaj paŝoj

Ni preparos demonstrado-diskedon, kiu montras helpe de 50 nocioj, kia estas la enhavo de "Lexicon silvestre" kaj kiamaniere oni povas uzi la enhavon helpe de IBM- kompatibla komputilo. Tiajn diskedojn ni sendos en aprilo al 200 forstaj bibliotekoj en la mondo. Ni atendas mendojn pri la diskedforma "Lexicon silvestre"

(kun ĉiuj 1025 nocioj kaj diversaj lingvokombinaĵoj). Ni anoncos la fondon de la "Patrona Asocio 'Lexicon silvestre' r.a." por varbi membrojn kaj sponsorojn. Kiam la nova asocio estos atinginta "supernacian karakteron", tiam eblos proponi ricevi monrimedojn kadre de la LINGUA-projekto de Eŭropa Komunumo.

Estas grave, ke ankaŭ la IFRE-anoj kaj aliaj kunlaborantoj de "Lexicon silvestre" varbu kaj konatigu nian verkaĵon. Tial ni aldonas "Gazetinformaĵon" kaj la statuton de la Asocio. Ni esperas, ke vi uzos tiun ĉi materialon kaj la materialon de FI no. 26, por publikigi artikolojn speciale en la forstfakaj revuoj de via lando. Ni uzu ĉiujn eblecojn varbi por nia projekto. Tiel ni povos trovi iom post iom agnoskon de "Lexicon silvestre" kaj subtenon por daŭrigi la [verkadon](#).

Dum la sekvonta monato ni denove elsendos la materialon de "prima pars", por ke ĉiu kunlaboranto denove kontrolu la parton de la respektiva lingvo. Ni rimarkis, ke kelkfoje la terminoj ne estas konformaĵ al la difino, sed estas tradukoj de germanaj terminoj. Ekzemple la nocio 0806 "mapo, forstarea" estas mapo de forstareo/0840/, sed ne baza mapo, aŭ fundamenta mapo aŭ mapo de grundo. Alia ekzemplo estas la nocio 0769, kiu ne koncernas la enhavon de la nocio 0241. Tial ni petas ĉiujn kunlaborantojn fari tiun kontrolon zorgeme.

Ni lpibonigis kelkajn difinojn, sed ŝanĝis nur la sencon de nocio 0375 de iama objekto al nuna agado, ĉar la plimulto de la kunlaborantoj konsideris ĝin kiel agadon.

Ni nun uzas du novajn mallongigojn:

pp se paroli pri
cf komparu

Ni esperas, ke en junio ni povas eldoni la diskedojn kun la kontrolitaj partoj.

Ni daŭrigos kontrakti kun eldonejoj pri la eldono de "Lexicon silvestre" en formo de libro.

Dr. K.-H. Simon

Aldonaĵoj

- 1) Statuto de la Patrona Asocio "Lexicon silvestre"
- 2) Regularo pri kotizo
- 3) Informo al la gazetaro

ALDONAĴO 1

Eberswalde-Finow 1993-03-16

Statuto de la Patrona Asocio "Lexicon silvestre" r.a.

1. Nomo kaj sidejo de la asocio

- 1.1. La asocio havas la nomon
"Patrona Asocio 'Lexicon silvestre' r.a."
- 1.2. La asocio havas sian sidejon en Eberswalde-Finow kaj estas registrita en la Registro de Asocioj

2. Celo de la asocio

- 2.1. Celo de la asocio estas la patronado pri la laboro por la verkaĵo "Lexicon silvestre". Tiu ĉi verkaĵo estas datenar-bazo de la forsta fako.
La verkaĵo estiĝas per la kooperado de forstistoj kaj aliaj fakuloj en internacia kadro.
La egalrajteco de ĉiuj lingvoj estas la senrezignebla bazo de tiu ĉi laboro.
- 2.2. La asocio subtenas en tiu ĉi konekso ĉiujn agadojn, kiuj servas la internacian kooperadon.
- 2.3. La asocio intencas nur celojn de publika utilo laŭ la senco de la ĉapitro "Celoj privilegiitaj rilate imposton" de la imposto-[reglamento](#).
- 2.4. Monrimedoj de la asocio devas esti elspezataj nur por celoj laŭ statuto. La asocianoj ne ricevas gratifikaĵojn el monrimedoj de la asocio.
- 2.5. Ne estas permesata privilegio iun personon per elspezoj, kiuj estas fremdaj al la celoj de la korporacio, aŭ per tro alta kompenso.

3. Agadoj de la asocio

La asocio plenumas sian taskon per sekvaj agadoj:

- 3.1. Subteno de la forstfakaj, lingvaj kaj teknikaj laboroj pri "Lexicon silvestre".
- 3.2. Varbado pri la projekto "Lexicon silvestre"
- 3.3. Estigo, evoluigo kaj daŭrigo de ligoj al elektitaj politikistoj kaj elstaruloj, asocioj kaj publikaj organoj de la forsta fako.
- 3.4. Koncedo de stipendioj aŭ premioj.

4. Membreco

- 4.1. Membro de la asocio povas fariĝi naturaj kaj juraj personoj, kiuj akceptas la statuton. Rajto pri membriĝo ne ekzistas.
- 4.2. La skriba deklaro pri membriĝo efikas per la aprobo de la membrokunveno.
- 4.3. La membreco finiĝas per ekŝiĝo, morto, ekskludo aŭ nuligo.
- 4.4. La ekŝiĝon oni skribe deklaru al la direkcia konsilio (asocia estraro). La devo pri membrokotizo ekzistas ĝis la fino de la kuranta financa jaro.
- 4.5. La ekskludo el la asocio estas permesebla nur pro grava kaŭzo, tio estas precipe asocio-damaĝanta sinteno. Pri la ekskludo decidas post propono de la direkcia konsilio aŭ de alia asociano la plej proksima membrokunveno. La direkcia konsilio devas sciigi la proponon al la ekskludota asociano almenaŭ du semajno antaŭ la kunveno.
La ekskludo efikas ekde la decido de la membrokunveno. La direkcia konsilio skribe sciigas la decidon al la koncerna asociano. La direkcia konsilio rajtas, suspendi la membrecon de asociano ĝis la sekvonta membrokunveno.

4.6. La nuligo de membreco okazas, se asociano ŝuldas dum 6 monatoj jarkotizon kaj ankaŭ ne pagis la kotizon ene de tri monataj post elsendo de la pagopostula letero al la lasta adreso, sciigita al la asocio. La nuligo okazas per decido de la direkcia konsilio kaj estas sciigota skribe al la koncerna asocio.

5. Financaj rimedoj

5.1. La financaj rimedoj de la asocio rezultas el kotizoj kaj mondonacoj.

5.2. Kotizo estas pagenda. Ĝian kvanton kaj pagan limtempon fiksas la membrokunveno. La kotizo estas pagenda anticipe.

6. Organoj de asocio

6.1. Organoj de asocio estas:

- la membrokunveno
- la direkcia konsilio (asocia estraro)

7. La membrokunveno

7.1. Al la taskoj de la membrokunveno apartenas precipe

- elekto kaj forelekto de la direkcia konsilio,
- elekto de kasrevizoro,
- akcepto de la jar-raporto de la direkcia konsilio,
- senŝarĝigo de la direkcia konsilio,
- decido pri la akcepto aŭ rifuzo de deklaro pri membriĝo,
- decido pri ekskludo de asocio,
- fiksado de la kvanto kaj pagodato de la kotizo,
- decido pri la amplekso de la financa decida kompetenteco de la direkcia konsilio,
- decido pri la principoj de la kompenso de elspezoj (vojaĝelspezoj k.a.),
- decido pri la ŝanĝo de la statuto,
- decido pri la malfondo de la asocio.

7.2. La membrokunveno estas kunvokota,

- se tion postulas la intereso de la asocio, sed almenaŭ unufoje ene de kalendara jaro,
- se almenaŭ 20% de la membraro tion postulas per skriba propono; en tiu kazo la direkcia konsilio kunvoku la membrokunvenon ene de 14 tagoj. La dato de la kunveno estu ne pli malfrue ol 6 semajnoj post la efika postulo.

7.3. La direkcia konsilio kunvokas membrokunvenon perletere kun anonco de la tagordo, observante minimuman periodon kun anonco de la tagordo, observante minimuman periodon de kvar semajnoj. La periodo komenciĝas je tiu tago, sekvanta la elsendon de la invito.

Komunikaĵoj de la asocio al la asocioj estas rigardataj kiel ricevitaĵoj, se ili estis adresitaĵoj al la lasta adreso, sciigita al la asocio.

7.4. Pri proponoj rilate al anstataŭigo de la direkcia konsilio, pri ŝanĝo de la statuto kaj malfondo de la asocio, pri kiuj la asocioj ne jam ricevus informon kun la invito al membrokunveno, oni povas decidi nur dum la sekvanta membrokunveno.

7.5. Ĉiu laŭregule kunvokita membrokunveno estas decidpova.

7.6. Dum la membrokunveno oni voĉdonas per monro de levita mano. Laŭ propono de almenaŭ 20% de la ĉeestantaj asocioj oni voĉdonu sekrete. Ĉe voĉdono decidas la simpla plimulto de la donitaj voĉoj. La forelekto de la direkcia konsilio, ŝanĝoj de la statuto kaj la malfondo de la asocio eblas nur

fare de la plimulto de du trionoj de la validaj voĉoj. Balotoj ĉiam okazu sekrete.

- 7.7. Decidoj pri ŝanĝoj de la statuto kaj pri la malfondo de la asocio estas anoncendaj al la financoficejo. Statutoŝanĝoj, kiuj tuŝas celojn de publikaj utiloj, nomitajn en punkto 2., postulas la konsenton de la financoficejo.
- 7.8. Pri la decidoj de la membrokunveno estas farota protokolo, kiun subskribu la protokolanto kaj la lasta kunveno-estro.

8. Direkcia konsilio (asocia estraro)

- 8.1. La direkcia konsilio konsistas el 3 aŭ 5 personoj.
Al direkcia konsilio apartenas la trezoristo.
- 8.2. La direkcia konsilio estas elektita fare de la membrokunveno por unu jaro.
- 8.3. La direkcia konsilio povas esti forelektata dum sia oficoperiodo sole per elekto de nova direkcia konsilio.
- 8.4. Kiam eliĝas membro el la direkcia konsilio antaŭ la limdato de sia ofico, tiam vokas la restanta direkcia konsilio kompensanton kiel komisiiton. La voko bezonas la aprobon fare de la plej proksima membrokunveno.
- 8.5. La direkcia konsilio faras siajn decidojn per simpla plimulto de la voĉoj.
- 8.6. Po du membroj de la direkcia konsilio reprezentas kune la asocion.

9. Financa jaro kaj raporto pri financoj

- 9.1. La financa jaro estas la kalendarajaro. La unua financa jaro finiĝas je la 31-a de decembro de la fondojaroj.
- 9.2. La direkcia konsilio devas prepari ĝis la 31-a de marto ĉiujare la raporton pri la agadoj (bilanraporton) de la asocio kaj ĝiajn financojn (financan raporton) por la estinta financa jaro.
- 9.3. La kontrolo de la jara financa raporto estas farota per la financrevizoroj, determinitaj de la membrokunveno.

10. Malfondo de la asocio

- 10.1. La asocio povas esti malfondata per decido de la membrokunveno.
- 10.2. Ĉe malfondo de la asocio aŭ ĉe nuligo de la celoj, privilegiitaj rilate imposton, la propraĵo de la asocio laŭ decido de la membrokunveno estas transdonata prefere al la "Forst-Förderverein Eberswalde" aŭ al alia asocio kun publika utilo. Tiamaniera decido estas realigebla sole post konsento de la financoficejo.
- 10.3. Se la membrokunveno ne alie decidas, la direkcia konsilio estas likvidanto.

Tiu ĉi statuto estas aprobita okaze de la membrokunveno je la 16-a de marto 1993.

Direkcia konsilio (Asocia estraro)

ALDONAĴO 2

Partrona Asocio "Lexicon Silvestre"

Regularo pri kotizo

1. La jaro kotizo estas 20.- DM (Germanaj Markoj).
 - Krom tio eblas mondonacoj fare de ĉiu membro.
2. La kotizo estas pagenda ĝis la 31-a de januaro de la kunranta jaro.
3. Tiuj asocioj, kiuj aktive kunlaboras pri "Lexicon silvestre", laŭ propono povas esti liberigataj de la kotizo.

Aprobata je 1993-03-16.

Direkcia konsilio (Asocia estraro)

Konto: Kreissparkasse Eberswalde
BLZ: 170 523 32
Konto n-ro: 390 108 81

ALDONAĴO 3

D-ro Karl-Hermann Simon

Informo al la gazetaro

Eberswalde-Finow, 1993-04-01

"Lexicon silvestre" – projekto de multlingva forstfaka vortaro

1. Elira situacio

La ĝis nun ankoraŭ kreskanta ŝarĝado de la vivomedio kaj senrespekta ekspluato de la naturaj riĉaĵoj kaj pro tio la endanĝerigo de la arbaroj postulas urĝe internacian interŝanĝon de informoj kaj kunlaboradon de forstistoj. Kaŭze de la polisemio de multaj forstfakaj terminoj kaj kaŭze de mankantaj difinoj en la plej multaj multlingvaj forstfakaj vortaroj, eraraj informoj ofte okazas. En kelkaj lingvoj ekzistas glosaroj pri forstfakaj terminoj. Sed kongruo ne ĉiam estas atingebla, se oni komparas la diversajn lingvojn, ĉar la glosaroj klarigas fakvortojn (terminojn) kaj ne nociojn – en la senco de la terminologia scienco – Sole terminoj, kiuj baziĝas sur unueca internacie akceptita sistemo de nocioj povas garantii konsiderinde senmankan interŝanĝon de informoj kaj tiel kontentigi la pli kaj pli intiman ekonomian interplektiĝon, kiel evoluas kadre de Eŭropa Komunumo kaj kiel tion postulas la problemoj de la medio. En 1981 internacia grupo de forstistoj komencis kompili tian nocio-sistemon. En Eberswalde, kie oni kunordigas tiun ĉi verkadon, ekzistas ekde septembro

1991 teamo de 9 kompetentuloj, kiu kadre de laborprojekto, pagita de la laboroficejo prezentis la provekzempleron de "Lexicon silvestre" al forstfakuloj okaze de la jubilea kongreso "International Union of Forestry Research Organizations" (IUFRO).

2. Internacia noveca valoro kaj avantaĝo de "Lexicon silvestre"

- 2.1 La verkaĵo eliras de difinitaj forstfakaj nocioj.
- 2.2 La verkaĵo prezentas 1000 nocioj po 1000 ĝis 5300 fakvortoj (terminoj) en 24 lingvoj.
- 2.3 La difinoj estas indikitaj samsence en 5 mondlingvoj kaj la Internacia Lingvo (Esperanto) kaj pro tio la verkaĵo havas por tiuj lingvoj samtempe leksikan karakteron.
- 2.4 La nocioj estas ordigitaj laŭ "Forestry Decimal Clasification" kiun oni ĉi tie unuafoje aplikas en forstfaka vortaro.
- 2.5 La verkaĵon oni povas vendi sur elektronika datum-portilo.

3. Kromaj avantaĝaj efikoj de la laborado pri "Lexicon silvestre"

- 3.1 La verkaĵon oni tuj povas transpreni en la instalotan datenaran bazon de la sekretario de IUFRO en Viena.
- 3.2 La verkaĵo estas bazo por la internacia forstfaka terminologia laboro de IUFRO kaj tial ankaŭ stimulos la nacilingvan terminologian laboron.
- 3.3 La en "Lexicon silvestre" enhavanta parton en la Internacia Lingvo Esperanto oni povas senpere transpreni kiel norm-terminaron en la programaron "Distributed Language Translation", kiu utiligas tiun lingvon kiel perantan lingvon por aŭtomatika traduko inter la lingvoj de Eŭropa Komunumo.
- 3.4 Fare de la praktika laboro de pli ol 100 forstistoj el 25 landoj pri "Lexicon silvestre" la internacia interkompreniĝo kaj kunkaborado de forstistoj estas evoluigata.

4. Plia celo

En la jaro 1993 la araba kaj litova partoj estos enmetitaj en "Lexicon silvestre". Ĝis fino de 1995 pliaj 1000 forstfakaj nocioj estos prilaboritaj. La inkludo de la ĉina kaj estona lingvoj jam estas komencitaj. La verkaĵo tiam ampleksos 28 lingvojn.

Ĉar ĝis nun ne ekzistas ŝanco ricevi publikajn monrimedojn por daŭrigi la laboron post la fino de la laborprojekto de la laboroficejo Eberswalde en aŭgusto 1993, la danĝero ekzistas, ke tiu tre efektive verkanta kaj nuntempe almenaŭ en Eŭropo sola teamo de specialistoj disfalos.

La valoro, kiu estas kreita en pli ol 12 jaroj, jam superas 3 milionojn da Germanaj Markoj.

Je 16-a de marto 1993 okazis la fondkunveno por "Patrona Asocio 'Lexicon silvestre' ". Per tio pli forte evoluu la publika kaj privata subtenoj por tiu ĉi internacia forstterminologia datenar-bazo kaj la leksika verkaĵo.

fake kaj lingve reviziis: Ingward Ullrich